FN PER ANC 47


# Normanda Esperanto-Bulteno

BULLETIN TRIMESTRIEL    TRIMONATA BULTENO

Nº 52a (nova serio)   Nº 137a   AUTUNO 1980



REDAKTAS : Jean GIBAUX 28 rue Raoul Dufy 76600 LE HAVRE



Eldonita, ekspedita de :
UNION DES ESPERANTISTES DE NORMANDIE    C.C.P. 283 40 H ROUEN

KOTIZOJ : Minimuma kotizo : 10.00 Fr. - Subtenkotizo : ek de 15 Fr.
Nura abono al Normanda Esperanto-Bulteno, sen membreco : 10 Fr.


"La verkantoj respondecas pri la enhavo de la subskribitaj artikoloj"

## LA LIMOJ DE NIA NEUTRALECO

Ni ofte diris ke nia Unuiĝo estas neŭtrala rilate al politiko, religio, filozofio. Ĝi eĉ estas neŭtrala rilate al aliaj naciaj kaj internaciaj esperantistaj asocioj .

Ĝi nur celas regrupiĝi la Samideanojn kiuj loĝas en nia provinco,kvankam ni ĉiam insistis ke tio ne sufiĉas ! U N E estas la unua ŝtupo de ŝtuparo kiun ĉiu devus surgrimpi .

La Samideanoj kiuj konsistigas nian anaron, estas diversopiniaj. Ni sufiĉe bone konas unuj la aliajn por aserti ke ĉiuj estas bonaj homoj, bonvolemaj, pacemaj, favoraj al idealo de intergenta amikeco kiun deziris nia majstro Zamenhof .

Pro tio, mi opinias ke nia anaro estas unuanima por kondamni la lastajn murdajn perfortaĵojn okazintajn en Italio, en Munkeno kaj en Parizo. Nia neŭtraleco havas limojn : ni ne povas akcepti propagandon favoran al ras - malamo; ni ne povas silenti kiam iuj ĵetas bombojn meze de homamasoj.

Ni ne forgesu la celojn de nia lingvo ; la juna juda Zamenhof suferis pro la persekutoj kaj pro la intergenta malamo; tio donis al li la deziron kaj la ideon krei ilon por pliproksimigi la homojn. Esperanto estis kreita por tia celo. Tion bone komprenis la faŝismaj regnestroj kiuj persekutis Esperantistojn .

Eble la idealo de Zamenhof estis iom naiva. Tamen la Esperantistoj devus ĉiam stari inter la unuaj por batali kontraŭ rasismo kaj ŝovinismo. Nur tiel ni estos konsiderataj kiel seriozaj homoj, nur tiel ni servos Esperanton .

Petro KIĴO


Polycopié par le Groupe Esperantiste Rouennais - Dépôt Légal -
Le Gérant : P.LEMARCHAND    3ème Trim. 1980

# PERDITAJ AMIKOJ

LA BULTENO, kelkfoje, revenas al ni kun la indiko: " Ne plu loĝas je tiu adreso " - Tiu ĉagreniga informo ĉi-jare koncernis la sekvantajn nomojn : Ĉu vi havas informojn ?

S-ro LETESSIER Jean Pierre
153 rue Basse — 14 000 CAEN

S-ro MERIEL
16 rue des Canadiens-Saint André — 14 320 MAY s/ ORNE s/O.

F-ino FELIX
Résidence du Nouveau Port-Bat N3 — 14 470 COURSEULES s/ MER

S-ino FAVRE Elina
32 rue de la Marine — 27 700 LES ANDELYS

S-ino LA FRANCE
Bat.C n° 2 - Le Bourgault — 27 700 LES ANDELYS

S-ro BOUGEARD Yves
F.M.J.T. 12 rue J.Wolf — 61 200 ARGENTAN

S-ino BRIONNE Jacqueline
Ecole de Chaumont — 61 230 GACE

Ges-oj COSSON Michel
Impasse Giffard — 76 000 ROUEN

S-ino FRERET
71/73 rue Dr.Merry Delabest — 76 000 ROUEN

S-ino HALLEY
6 rue des Champs de Mars — 76 000 ROUEN

S-ro LETEURTRE Jacques
27 Imp? Galilée - Imm.Castor App 72 — 76 000 ROUEN

Ges-oj BARICAULT Jean Michel
37 Bard.Maurice Ravel "Les Mouettes" — 76 120 GRAND QUEVILLY

Dok-ro GENEL J.M.
280 route de Dieppe — 76 250 DEVILLE les ROUEN


S-ro REJIOR Michel
1 032 rue Ernest Renan - Château Blanc. — 76 800 ST ETIENNE ROUVRAY

HELPU AL NI RETROVI ILIN !!

-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-

De RENNES venas al ni ĝojigan informon : Juna Esperantisto CYRILLE aperis en la hejmo de Monique kaj Christian BERTIN

KORAJN BONDEZIROJN !



Oh ! tiom ne multas
Esperantanoj, denaske....
Tial Gepatroj meritas
Gratulojn, senmanke !

Ĝojano

# VIVO DE LA GRUPOJ

R O U E N

Grava poresperanta aktiveco estiĝis lastatempe en la Junulara Kulturdomo :

E k s p o z i c i o

Dum la tuta semajno de la 8a ĝis la 15a de Novembro, de la 8a ĝis la 22a horo !
Prezento de la libro-ekspozicio de S-ro Lentaigne, kaj ankaŭ ekspono de gazetoj kaj revuoj .

Kvankam la informkunveno ne altiris multajn homojn, la ekspozicio kreis agadetoson dum la tuta semajno, por la preterpasantaj uzantoj de la Kulturdomo, kie Ruenaj gesamideanoj laŭvice deĵoris por interesigi kaj informi la vizitantojn.

R a d i o  N o r m a n d i e

Por informi pri la malfermo de tiu ekspozicio, la radio-stacio intervjuis S-ron A.Loisel, lundon la 10an de Novembro, je la 12.30 horo ;

Por la sama temo, la Normanda stacio raportis post la fermo de la ekspozicio la 20.11 .

K u r s o j

Kiel sekvo de tiu manifestacio, kursoj malfermiĝis ĉiumerkrede, en la sama loko :

Unuagrada, de la 19a ĝis la 20a horo, kun 7 lernantoj .

Duagrada, de la 20a ĝis la 21a30 horo kun 7 lernantoj (kiuj komencis pasintan jaron)

Perkoresponda kurso estas starigata por la personoj kiuj ne povas ĉe-esti la kursojn .

P.L.

A g a d o

Ankaŭ en la Kulturdomo, okazis kanto-semajno dum kiu sinsekvis pluraj gekantistoj : unu el ili prezentis, inter aliajn , kantojn en la Internacia Lingvo .

G R A N D  Q U E V I L L Y

Post Inform-kunveno en la Amikaro Bastié, kursoj estas malfermataj, kiuj okazas ĉiujaŭde :

4 lernantoj por la unuagrada kurso, de la 18a ĝis la 19a horo

2 lernantoj por la duagrada kurso, de la 19a ĝis la 20a horo.

P.Q.

N A T U R A M I K O J

Dudeko da Naturamikoj, uzantoj de Esperanto, el Parizo kaj Rouen, rendevuis en la Junular-gastejo de Mantes, dum la 25a kaj 26a de Oktobro . Oni povas paroli pri " kunpraktikado " de du fakoj : promenado en la naturo plus babilado en Esperanto. La novbakitaj Esperanto-parolantoj povis ekprovi ekster la limoj de la kurso , siajn lingvo-kapablojn.

Y V E T O T

Elementa kurso funkcias kun tri lernantoj .

# VIVO DE LA GRUPOJ

## L E H A V R E

GENERALA KUNVENO Ĝi okazis la 18an de Oktobro ĉe François 1er. S-ino Gontard prezidas, kaj bonvenigas al la 15 ĉe-estantoj kaj prezentas la pardonpetojn de 7 grupanoj .

M o r a l a R a p o r t o :

Kursoj S-ro A.Chalm daŭre gvidas elementan kurson en la M.J.C. Krome, li animas la Semajnajn Rondojn, en rilato kun Asocio por Konstanta Edukado : la ĉe-estantaro duobliĝis dumjare. Konata nun de ĉiuj grupanoj, tiu kunvenrimedo permesas facilan inter-ŝanĝon por estontaj renkontiĝoj en la Movado .
Individuaj kursoj estas organizotaj pro personaj maleblecoj de eventualaj lernantoj , por iri al lakursoj .

Monataj Kunvenoj La debat-temoj estis variaj ĉi-jare , kaj ni adoptis aŭdvidajn teknikojn .

Manifestacioj La Komitato ĉefe dediĉis siajn fortojn por orga - nizi la akcepton de niaj Britaj Amikoj .

Marto : 14 membroj de la Grupo partoprenis en la Kongreso de U N E , kiu arigis 74 personojn en Asnelles . Tiu manifestacio havis eĥojn ĉe informelsendo de regiona Radio-stacio , kaj lokaj gazetoj priraportis .

Aprilo : Deko da Soton-anoj favore respondis al nia invito por la semajnfino 26 kaj 27a de Aprilo. La Normandaj Grupoj amike kunlaboris por la sukceso de tiu vizito . La klopodoj de la organiz-komitatoj permesis la viziton de la elektrocentralo en Le Havre , kaj la akcepton far la urbokonsilantoj de Yvetot dum la dimanĉo . Koran dankon pro la helpo de ĉiuj .

F i n a n c a R a p o r t o

La situacio financa retrovis sian ekvilibron.
Oni aĉetis kelkajn librojn por la biblioteko de la Grupo .
Notu ke la aĉetoj kaj vendoj de libroj por la membroj ne estas organizata kun profitiga celo, sed por servo al la membroj .

Kotizoj Malgraŭ la konstanta altiĝo de la kostoj, oni decidas lasi la grupkotizon je la sama nivelo : 15 Fr.
Oni atentigas ke la subvencio de la Urbo ne ŝanĝiĝis depost pluraj jaroj .
Abonoj : oni rekondukas la abonojn de la Grupo al la revuo " Esperanto" , kaj de la M.J.C. al "Heroldo " .

B a l o t o p o r l a k o m i t a t o

S-ro Laney eksiĝas el la Komitato, pro familiaj zorgoj ; la kunvenantoj dankas lin pro lia longtempa helpo en la estraro. S-ro Paul Mary estas proponata por lin anstataŭi . Li estas unuanime, samkiel la elirantaj membroj elektita .

-S-ino Gontard fermas la Kunvenon je la 19a horo.

o——o——o——o——o——o

Post tiu laboriga Kunveno , dudeko da grupanoj retroviĝis kaj ĝuis amikan vespermanĝon en Havra restoracio

o——o——o——o——o——o

Komitato de Havra Grupo

# K A R A J   S A M I D E A N O J

-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-

Nous voulons profiter de cette page, qui est destinée à vous mettre en relations avec le Trésorier de l'Union Normande .... et les autres, pour remercier de tout coeur S-ro E. JOUIS qui, durant de très longues années, a assumé cette tâche (parmi tant d'autres pour l'Esperanto) .

Et, maintenant, nous vous serions reconnaissants de bien vouloir donner du travail à notre nouveau trésorierS-ro Pierre LEMARCHAND 43 rue Desseaux - 76100 Rouen , en lui adressant vos cotisations, ou en créditant directement notre compte-courant postal :

Union des Esperantistes de Normandie
CCP 283 40 H ROUEN

Cotisation : 10 Fcs - Cotisation de Soutien : à partir de 15 Fcs

---

## Autres cotisations et Abonnements pour l'Année 1981

### Associations Françaises

U F E règlt.à Fédération Normande des Centres Culturels Esperanto
CCP 2 348 06 C ROUEN
S-ro TAILPIED "La Marvento" Hennequeville - 14100 TROUVILLE
Membre Simple = 30
Membre Abonné = 105

SAT-Amikaro :S-ro André SADIER 22 Av. Paul Vâillant Couturier
93000 BOBIGNY CCP 765 805 C PARIS
Membre, reçoit la revue = 70
Jeunes, jusqu'à 25 ans = 40
(Nouveaux abonnés + 3 Fcs

### Associations Internationales

U E A règlt.comme U F E
MJ : Membre, reçoit l'annuaire = 54
MA : Membre abonné: annuaire+ Revue = 135
SA : Abonnement Revue mensuelle seule= 81

S A T 67 Av.Gambetta - 75020 PARIS - CCP 1234 22 PARIS
Membre , reçoit l'organe mensuel = 90
Abonnement revue annuelle "Sennacieca Revuo" 18

### Revues Diverses

HEROLDO règlt. comme U F E
Journal bi-mensuel = 64

LE TRAVAILLEUR ESPERANTISTE 179 rue Ordener - 75018 PARIS
CCP 902 52 F PARIS
Bulletin mensuel = 25

MONATO règlt. à Club d'Esperanto de Metz
M.J.C. 36 rue Saint Marcel - 57000 M
chèque bancaire,ou CCP 3 volets sans designation
Magazine mensuel = 112

EL POPOLA ĈINIO règlt. comme U F E
Revue Chinoise mensuelle 1 an = 26.40
2 ans = 44
3 ans = 68

-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-

## L I S I E U X

Tri Lekzovianoj ĉeestis la VIan Internacian Konferencon de N.E.M. (Neŭtrala Esperanto Movado), kiu estiĝis de la 26a de Julioĝis la 1a de Aŭgusto en Strasburgo.
Partoprenis aliĝantoj el 14 landoj.

Ĉar konferencejo, manĝejo, kaj loĝejo koncentriĝis en la sama restadejo, tuttage viglis esperanta zumado.

Severaj diskutadoj ne formanĝis la tutan tempon, distraj programeroj enŝoviĝis : kultura vespero entenanta klasikan muzikon kaj Alzacajn dancojn kaj kantojn ; vizitado de la urbo, kaj, interalie, ties Palaco de Eŭropo, tuttaga ekskurso tra Altaj Vogezoj, bankedo apud Rejno... ktp...

Krome, estis sufiĉe da libera tempo por personaj aranĝoj.

Sume : agrabla semajno, simpatia etoso, ĝojigitaj per vere somera vetero.

C. MARTIN

**A U S T R A L I A N O** vizitos Francion kaj, nun, turneo estas aranĝata, interalie en nia provinco : ni esperas povi informi la respondeculojn de la Normandaj Grupoj por ion organizi.

**NEKROLOGO** Ni kun bedaŭro sciigas pri la forpaso de Sinjorino Hélène LAVALLEE, el Le Havre, en aĝo de 81 jaroj.
Ŝi lernis Esperanton en 1954a, kaj rapide trapasis ekzamenojn, ĝis la "Pedagogia". Dum jaroj ŝi gvidis kursojn, kaj korektis perkoresponde, kun granda kompetenteco, taskojn de lernantoj.
Fervora vizitantino de Kongresoj, ŝi havis multajn korespondantojn.

**ONI FLUSTRAS** en la Estraraj Kunvenoj, ke la venonta Ĝenerala Kunveno povus okazi en la Suda parto de Normandio ! Estus ege bone ĉu ne ? -Sed ni atendu la sekvontan Bultenon .....

o———o———o———o———o———o

VOUS AVEZ PU LIRE dans ce 137ème numéro :

- Les Limites de Notre Neutralité (P.Kijo) = la neutralité ne signifie pas une passivité aveugle devant la violence.

- Croyez-vous que l'on puisse perdre des Amis ? c'est pourtant le sentiment que l'on ressent lorsque le bulletin nous revient, " n'habite pas à l'adresse indiquée " .... heureusement, vous verrez qu'il arrive des " remplaçants " (p.[illegible])

- La Vie des Groupes révèle un regain d'activi[illegible], surtout à Rouen, où " Radio Normandie" était dans le coup. (p.3-4)

- Bien sûr, un peu de "baratin " est nécessaire, quand on fait appel au "monujo" mais quel plaisir de recevoir régulièrement une publication en Esperanto ! (p.5)

- Des nouvelles diverses, à suivre ... (p.6)

Polycopié par le Groupe Esperantiste Rouennais -
Le Gérant : P. [illegible] - Dépôt Légal - 3ème Trimestre 1980